

## MEDITADO PRI LA MORTO

verkita de *Éric Bernard COFFINET* je la 23a de decembro 2024

Portempaj estas ja niaj pasioj,  
niaj deziroj kaj niaj havaĵoj.  
Nepre la morton spertos ĉiuj homoj.  
Poste valoros nur niaj bonagoj,  
kiuj sonoros por eternaj tempoj.

Nia korpo konsistas el polvo de steloj, kaj polvo devas reveni al polvo.

Sed en ĉiu el ni estas ankaŭ deponita nepereebla brifero de dia lumo, kiun ni devas kreskigi por prilumi tiun surteran mondon kaj respondi tiun demandon kiam ni supreniros al nia Sinjoro : "kion faris vi per viaj talentoj ?" (1)

La transa mondo estas al ni tiel mistera por koncepti kiel estas la nia por naskonta infano. Transpasi de unu al la alia estas terurega salto en nekonatejon...

En tiu utera mondo ni akiris ĉion necesan al nia surtera vivo. Tio estas : menso por ami kaj koni, okuloj por kontempli la mirindaĵojn de tiu nova mondo, oreloj por aŭskulti ĝiajn melodiojn, lango por laŭdi ĝian Kreanton, manoj por partopreni Dian projekton, piedoj por vojaĝi kaj foren diskonigi Diajn vortojn.

Ĵus naskiĝintaj ni trovis por ni amantan koron, nutrantan mamon kie sekure ripozi, prizorgantajn okulojn, helpantajn manojn post ĉiuj faloj niaj kaj kuraĝigan rideton... Dankon Panjo !

La kialo de nia alveno en tiu surtera mondo estas kreskigi la diajn ecojn, kiuj estas latentaj kerne de ni, por sur la tero starigi la Regnon de Dio kaj en la ĉieloj senfine manifesti la perfektecon de nia vera naturo homa, ne mortema sed spirita.

La sinsekvaj profetoj havis neniun mision krom gvidi la homaron sur la rekta vojo de la Vero. Sed kiel ni kapablas rekoni tiun Veron se ĝi ne estus jam en ni mem ?! La celo de ilia mesaĝo estas instrui ĉiujn homojn por ke, en stato de pureco, de sankteco kaj de perfekta malligiteco, ili povu releviĝi ĝis la trono de la Plej-Alta.

Ni estu nek timigitaj de la morto nek malesperigitaj de niaj kulpoj kaj de niaj mankoj, sed ni gardu esperon kaj fidon ĉar Dio estas nur amo. Dio estas ĉiam plej proksima al ni, kvankam ni estas ofte malproksimaj al Li. Dio ĉeestas, atendas, ĉiam pretas favore plenumi niajn preĝojn kaj akcepti nin kiel Siajn gefilojn plej amatajn kvankam malatentajn, maldankemajn kaj malŝparemajn. (2)

Meditu kion respondis la persa Majstro 'Abdu'l-Bahá' al iu serĉanto demandinta kiel konsideri la morton : "Kiel ni konsideru alproksimiĝon de vojaĝa celo ? Ĉu ne estas kun espero kaj ĝojo ? Nu, same estas pri tiu surtera vojaĝo. En la transa mondo la homoj estos liberigitaj de la plej multo de nekapabloj, kiuj aktuale malfortigas ilin. Tiuj la morton transpasintaj havas propran mondon, sed tiu mondo ne estas malproksima al la nia. Ilia tasko en la Regno estas same kiel la nia, sed ĝi estas apartigita de niaj kutimaj nocioj de tempo kaj spaco. Tie-ĉi nia tempo dependas de la suno sed, se ne plu estus sunleviĝoj kaj sunsubiroj, tia tempo ne plu ekzistus por la homoj. Tiuj suprenirintaj en la ĉielojn havas atributojn, kiuj diferencas de homoj ankoraŭ vivantaj sur la tero, sed fakte ne estas reala disiĝo. Dum preĝado tiuj statoj kaj kondiĉoj kunfandiĝas. Ni do preĝu por ili, same kiel ili preĝas por ni !"

(1) : vortludo kun "talantoj" en evangelio laŭ sankta Mateo 25/14-30.

(2) : aludo al la evangelio laŭ sankta Luko 15/11-32.